

*Vidigas ĝi, ternante, planon  
Ĉagreni vin intence!*

Horo.

(en kiu partoprenis la kuiristino kaj la bebo mem)

*Ŭaŭ, Ŭaŭ, Ŭaŭ!*

Dum la Dukino kantis la duan verson ŝi forte kaj daŭre ĵetadis la infanon supren kaj rekaptis ĝin, kaj la kompatinduleto tiel forte kriegis ke Alicia apenaŭ povis aŭdi la vortojn:—

*Mi devas la infanon skui  
Kaj bati kiam ternas;  
Ĉar li la pipron povas ĝui,  
Jam longe li ĝin lernas.*

Horo.

*Ŭaŭ, Ŭaŭ, Ŭaŭ!*

“Jen! Se al vi plaĉas, *vi* povas varti ĝin!” diris la Dukino al Alicia kvazaŭ ĵetante la infanon al ŝi. “Mi devas pretigi min por la krocketludo ĉe la Damo” kaj ŝi eliris rapide la ĉambron. La kuiristino en la ĝusta elira momento ĵetis kontraŭ ŝi grandan kaserolon, sed ĝi maltrafis.

La infano estis strangforma kreaĵeto, kiu etendis la brakojn kaj kruojn en ĉiu direkto (kiel marstelo, pensis Alicia). Do apenaŭ al ŝi prosperis kapti ĝin. Tuj post la kapto ŝi rimarkis ke ĝi *puf-puf*—as kiel lokomotivo kaj alterne duobligas kaj rektigas sin. Sekve dum la unuaj minutoj Alicia apenaŭ povis teni ĝin.

Baldaŭ tamen ŝi eltrovis ke la unu nura metodo taŭge varti ĝin estas tordi la korpon en bantformon, kaj premeni dekstran orelon kaj maldekstran piedon, por ke ĝi ne malligu sin.

Tion farinte ŝi forportis ĝin for de la domo. “Se mi ne forportos ĉi tiun infanon, oni certe mortigos ĝin post nemultaj tagoj. Do, se mi ne forprenus ĝin, mi estus mem kulpa je la mortigo.”

La lastajn vortojn Alicia diris laŭte, kaj la etaĵo (ĝi jam de longe ĉesis terni) responde—porkblekis! “Ci ne devas grunti” diris Alicia; “tio ja estas tute maltaŭga rimedo por esprimi la sentojn!”

Sed denove la infano gruntis. Sekve Alicia tre serioze observis la vizaĝon, por vidi kio estas al ĝi. Sendube ĝi havis tre porkan nazon, kiu pli similis al porka nazego ol al hombeba nazeto; ankaŭ la okuloj fariĝis tre malgrandaj, kaj entute Alicia ne ŝatis la nunan ŝajnon.

“Eble ĝi nur plorkrietis” ŝi pensis kaj denove rigardis en la okulojn por vidi ĉu enestas larmoj.

Larmoj ne enestis.

“Se vi intencas fariĝi porketo” diris ŝi serioze “mi tuj ĉesos prizorgi vin; vi atentu tion!” La porkinfano denove plorkriis aŭ plorblekis (neeble estas paroli precize) kaj dum kelka tempo ili iris silente.

Alicio ĵus komencis pensi en si “Do, kion

